

Enskribo pri la komitata kunveno

okazinta la 8an de febr. 1952 en kafejo Slavia.

Komenciĝo je la 20.30. Ĉeestis gesamidanoj Vondroušek, Friedrich, Adamcová, Zitová, Chlubnová, Kovář, Borkovec kaj Kořínek. Gaste ĉeestis s-anino Vondroušková. Unue raportas s-ano Friedrich pri la interveno ĉe la centra Komitato de la Kompartio en Prago, la komunikon la komitatanoj kun intereso ekkonscias. Poste legas s-ano Kořínek lastan enskribon pri la komitata kunveno. Poste prezentas s-ano Kořínek la sekretarian raporton, kiun la komitatanoj kaŭ lia peto kompletigas per aldonoj kaj rimarkigoj, kaj la raporto estas aprobata. S-ano Borkovec donas kasistan raporton. Laŭ ĝi ni komencis la pasintan jaron kun bonhavo 5671.60 Kčs, finis kun Kčs 992,-. Kotizoj enspezigis Kčs 21.140, al la Asocio ni asignis 15.396,30 Kčs. La amuzaj kaj kulturaj vesperoj enspezigis 5737,-, elspezigis 7528,-. Por propagando kaj cetera kluba reĝio ni elspezis ĉ. 11.000 Kčs da suma spezo estis 92.000 Kčs.

(La pasintmarda Verda Karnavalo rezultigis profiton ĉ. 500 Kčs laŭ kromafera konstato). La kasista raporto estis ĉiesvoĉe aprobata. S-ano Vondroušek sciigas ke la membrar-stato estas 222. Oni diskutis pri la nova kandidatlisto kaj estis decidite krei propon-komisionon por kunmeto de kandidat-listo. Kunsido finiĝis je la 22.30 h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la komitata kunveno okazinta la 19.II.1952 je la 22.30 h. Al la komitatanoj nove elektitaj aŭ reelektitaj en la Ĝenerala kunveno la 12an n.m., oni decidis jenajn funkciojn. Prezidanto (elektita de la Ĝenerala kunveno): Josef Vondroušek; vicprezidanto Josef Friedrich, la sekretario Jiří Kořínek, lia sekretario Marie Adamcová, kasisto Tomáš Borkovec, bibliotekistino Nelly Zitová, komitatanoj: prof. Vilibald Scheiber, Drahomíra Chlubnová, Linbor Kovář. Revizoroj: Sáva Střelec kaj Miroslav Němec. Unu loko restas rezervita por ano de la estraro de Komenského Osvětová Beseda. Estas decidite aranĝi en majo Regionan Kunvenon. S-anino Adamcová atentigas, ke estas jam urĝa tempo fiksi la programon por la aprila Zamenhofa vespero kaj anonci ĝin ĉe la oficoj. S-ano prof. Scheiber promesas tion ĝis venonta mardo sciigi. Oni decidis laŭ propono de s-ano Vondroušek mendi por 260 Kčs glumarkojn ĵus eldonitajn de la Asocio. Proksiman sabaton aranĝas la uzina E-klubo de "Gottwaldovy závody" en sia klubejo en Alfa vesperon kun programo kaj danco. Estas rekomendate al ĉiuj membroj laŭcele partopreni. Finite je la 22.45 horo.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la komitata kunveno okazinta la 3.VI.1952 en la klubejo en hotelo Passage je la 21.45 h.

Ĉeestas: s-anoj Vondroušek, Adamcová, Zitová, Chlubnová, Friedrich, Borkovec kaj Kořínek.

Komence raportas s-ano Vondroušek, ke ĝis nun repagis kotizon 155 klubanoj. El la kursoj komencita de s-ano Vondroušek kun 8 enskribiĝintaj kaj gvidita de s-anino Vondroušková, finis kaj aliĝis al la klubo 7 kursanoj. Oni prijuĝas niajn pluajn ŝancojn kaj nian unuan staton de nia movado ĉe ni. Ĝi estas neniel esperiga. S-ano Friedrich raportas, ke nia klubo pagis ĉi-jare la plej multajn kotizojn al la Asocio en Prago. S-ano Borkovec konigas, ke nia kaso havas nun ĉ. 2000,- Kčs kaj ĉar estas ankoraŭ iaj ŝuldoj kaj pagotaĵo (klubejo de post novjaro, iaj ŝuldoj al la Asocia librovendejo) restas en la kaso ĉ. 900 Kčs. Por la sabata teatraĵo estas rekomendate al s-anino Borská por la kostumoj ne elspezi pli

ol 400 Kčs. Oni pagos al s-ano Borská krome 100,- Kčs elspezitajn por la programoj. S-ano Kořínek proponas, ke oni venonte ĉiun, kiu intencas kun ia kolektivo prezenti ion (teatraĵojn, koncertojn, art-vesperojn), invitu ankaŭ la komit. kunvenon, kie estos definitive la programo kaj aranĝo aprobata kaj fiksita event. financa subteno.

Finite je la 23a horo.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la Komitata kunveno okazinta la 9an de sept. 1952 je la 21.30 en la klubejo en hotelo Passage. Ĉeestis gesamideanoj: Vondroušek, Friedrich, Borkovec, Adamcová, Chlubnová, Kořínek, Scheiber.

Post tralego de la lasta protokolo fare de s. Kořínek s-ano Vondroušek proponas ciklostiligi ankoraŭ unu Kluban bultenon. Poste oni detale traktas pri la kunmeto de la programoj por la tempo ĝis fino de la jaro. La raporton de miaj reprezentantoj ĉe la malĝoja malfondiĝa komitata kunveno de la Asocio en Prago la komitatanoj aŭdis jam antaŭe. Oni decidis plenumi la peton de la klubanoj pri disdono de nia biblioteko inter la membrojn.

S-ro Vondroušek sciigas, ke la anoncita Esp. kurso ĉe la Kleriga Societo Komenský komenciĝos lunde la 15an de Sept. S-anoj Vondroušek kaj Friedrich promesis ĉeesti la enskribon.

La kunveno estis finita je la 10.45 h.

Enskribis Jiří Kořínek